Dep. legal: BI-1007-88

Nia Ponto

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrenkale Barrena, 7 - 1 dekstre
E-48005 Bilbao
☎: 94 416 44 92 / 696 613 958
🖳: tepgaitj@lg.ehu.es

Jar-kotizoj:
- Ordinara: 17 eŭroj / 2.829 pta.
- Familia: 30 eŭroj / 5.000 pta.
- Speciala: 14 eŭroj / 2.329 pta.

BBK-Konto: 22-1800155-0


Redaktoroj: Iñaki Vélez, Joxemari Sarasua

OKTOBRO 2001

E-O VENAS AL LA EŬSKA UNIVERSITATO

INDEKSO

La Estraro informas	2
Esperanto en ĵurnaloj	3
E-kurso en la Eŭska Universitato	4
Universala kongreso 2001 en Zagrebo	6
Paroliu kiel ebie bone	7
Lastaj libroj en Esperanto	8



LA ESTRARO INFORMAS

• LASTA ĜENERALA KUNVENO

Kiel vi scias, la 2-an de marto okazis la ĉiu-jara ĝenerala kunveno de nia Grupo. Tie oni aprobis la konto-staton kaj la buĝet-proponon por la nuna jaro, ambaŭ prezentitajn en la antaŭa cirkulero. Krome, oni elektis novan estraron kun jenaj membroj:

Prezidanto: Joxemari Sarasua Fernández
Vic-prezidanto Patxi de la Hoz Méndez
Sekretario: Iñaki Vélez Ortiz
Kasisto: Eduardo Larrouy López
Voĉ-donanto: José Pérez-Salado Kamps

La nova estraro dankas la antaŭajn estraranojn pro ilia sindona laboro dum la lastaj jaroj, kaj sam-tempe alvokas ĉiujn asocianojn por kunlaboro kaj parto-preno en la socia vivo de la klubo. Estrar-kunvenoj okazas ĉiu-monate, ordinare dimanĉe matene. La estraro memorigas, ke ĉi kunvenoj estas malfermitaj kaj ĉiu asociano estas bon-vena. Interesatoj bv. kontakti kiun ajn estraranon por detaloj pri tago kaj horo de kunvenoj.

• PAGO DE CUOTAS / KUOTEN ORDAINKETA

Si en el recuadro de la derecha aparece una X, eso significa que aún **tienes pendiente el pago de la cuota de socio correspondiente al presente año 2001**. En la primera página de esta circular, debajo de la mancheta, figuran los diferentes tipos de cuotas a los que puedes acogerte, así como el número de cuenta de la BBK en la que puedes hacerla efectiva. Te recordamos que debes indicar al empleado de la oficina que haga figurar tu nombre al hacer el ingreso. ¡Gracias de antemano por tu colaboración!

Ezkerreko laukitxoan X bat ageri bada, horrek esan nahi du oraindik **ez duzula ordaindu 2001 urteko bazkide-kuota.** Zirkular honen lehen orrialdean, mantxetaren azpian, hiru kuota eredu dauzkazu, zure egoeraren arabera dagokizun ekarpena egin dezazun. Bertan ere badaukazu BBK-ko gure kontu-zenbakia, ordainketa egiteko. Kontuan hartu, dirua sartzerakoan, bulegariari zure izen-abizenak jartzeko esan behar diozula. Mila esker, aldez aurretik, zure laguntzagatik!

LOTERIA DE NAVIDAD: nº 16252 (Venta de participaciones a partir de finales de Octubre)

ESPERANTO EN ĴURNALOJ

➔**En la ĵurnalo "El País"**, ene de la interna suplemento por Eŭskio, aperis la 23an de januaro 2001 du-kolumna intervjuo al Aitor Arana. Li estis prezentita kiel *"escritor y traductor"*, kaj frazo lia titolis la artikolon: *"Aunque no tiene televisión, el esperanto sigue vivo"*. Menciiĝas en la intervjuo liaj du-direktaj tradukoj eŭske-esperante. Demandita pri la senco de lia laboro, li respondas, ke ĝi utilas *"...para poder llevar la literatura vasca a aquellos lugares donde el esperanto goza de buena salud, pero no hay traductores del euskara a sus lenguas locales. Y a la inversa, también puede dar a conocer a los euskaldunes las grandes obras de los escritores en esperanto"*.

➔**En la gazeto "La Calle"**, disvendata surstrate, aperis la 14an de februaro artikolo titolita "Esperanto, un idioma universal". Ĝi enhavas plurajn malĝustaĵojn, kaj ankaŭ vortojn de nia asociano Joxemari Sarasua. La artikolo estas represo de alia artikolo publikigita antaŭ kelkaj jaroj en la samtipa strat-ĵurnalo "La Farola".

➔**En la ĵurnalo "El Correo"** de la 30a de majo 2001 aperas kontribuaĵo de publicisto Antón Merikaetxebarria. Tie oni parolas pri la ekzisto de strato en Bilbao kun la nomo "Esperanto", pro kio la ĵurnalisto miras. Post kelkaj ĝeneralaĵoj pri Esperanto, li aldonas: *"Resulta curioso que Bilbao le haya dedicado una de sus calles* [al Esperanto], *si bien es cierto que en la villa hubo cierto interés por dicha lengua, sobre todo a comienzos del pasado siglo. Tengamos en cuenta que en 1912* [pli ĝuste, inter 1909 kaj 1912] *se publicó la revista "Nova Sento. Esperanto Gazeta* [tiel!] *de Bilbao", promovida por el grupo esperantista del Botxo..."*. Nia asociano Iñaki Vélez afable klarigis al S-ro Merikaetxebarria, per letero publikigita en la sekcio "Cartas al director" la 31an de aŭgusto, ke Esperanto ne estas ja forpasinta afero en Bilbao...

➔**En la ĵurnalo "El Correo"**, ene de interna suplemento, aperis la 5an de junio 2001 tut-paĝa artikolo verkita de Sonia Gorostizaga sub la titolo: *"El esperanto, un segundo* [tiel!] *idioma universal"*. Sube legiĝas: *"Miles de personas se relacionan mediante este código* [tiel!], *que se plantea como el segundo idioma universal para garantizar el entendimiento entre los pueblos, sin necesidad de anular sus propias lenguas"*. Pli ol duono el la artikolo konsistas el elĉerpaĵoj tiritaj el la enkonduko de Fernando de Diego al sia lerno-libro "Nuevo Método de Esperanto", kiu teksto estis iam uzita de nia asocio por flug-folio. La rezulto entute estis pozitiva kaj populariga.

E-Kurso en la Eŭska Universitato

Nia asociano Jesús-Miguel García Iturrioz ĵus gvidis Esperanto-kurson en la Instruista Alt-lernejo --hispane Escuela de Magisterio- de la Eŭska Universitato -t.e. Universidad del País Vasco/Euskal Herriko Unibertsitatea-, kie li estas profesoro. Temis pri la unua fojo, ke esperanto estis oficiale instruata en universitato de Eŭskio. Jen li raportas kaj donas siajn impresojn pri ĉi mejlo-ŝtona atingo, tamen atentige por venontaj spertoj.

La kurso okazis inter la 12a de februaro kaj la 30a de majo 2001, post kiam mi mem proponis ĝin kiel liber-vole elekteblan stud-fakon kun oficiala valoro egala al 4.5 kreditoj, t. e. 45 instru-horoj. Enskribiĝis entute 23 lernantoj aĝaj inter 21 kaj 23 jaroj, el kiuj 18 sukcese finis la kurson.

Estas rimarkinde, ke Esperanto estis unua-foje agnoskita ĉe la Vaska Universitato kiel oficiala stud-fako. Antaŭe same okazis ĉe nur aliaj tri hispanaj universitatoj: en Valencio, Barcelono kaj Kanariaj Insuloj.

Jen grava atingo, ne nur ĉar tio ebligis sufiĉe efektivan propagandon en universitata medio, sed ankaŭ pro tio, ke danke al diversaj instruhelpiloj proponataj de la universitato eblis eksperimenti per alternativaj manieroj lernigi nian lingvon, malsimilajn al la tradiciaj en Esperanto-kluboj: lerno-libro, vortaro, tabulo, kreto kaj la instruista voĉo... Mi povis ekzemple elpiki fotojn el Interreto kaj projekcii ilin sur ekrano; ĉiu lernanto disponis komputilon por ricevi kaj sendi retmesaĝojn, kio permesis al ili teni korespondadon kun eksterlandanoj; mi povis sendi al ili ekzercojn, novaĵojn ktp. same perrete, kaj povis ankaŭ montri video-filmojn kaj prezenti al ili Esperanto-muzikon.

Ĉio ĝis nun similas kvazaŭ al paradiza pejzaĝo... Tamen, la fina rezulto ne estis, almenaŭ por mi, sufiĉe kontentiga. Jen sube mi skizas kelkajn faktorojn, kiuj iom bremsis la atingon de pli ambiciaj celoj:

1. Studentoj ne sufiĉe estimas la valoron de liber-vole elektebla stud-fako. Ni ne forgesu, ke ili povas akiri similajn kreditojn, ekzemple, praktikante iun sporton aŭ simple aliĝinte al gimnastejo. Ili konsideras, ke tiaj stud-objektoj devas esti pli facilaj ol aliaj pli "normalaj" fakoj. Ili do esperas sukcesi sen multa

studado.

2. La kurso ne okazis ja en filologia fakultato. Lernantoj estis ontaj instruistoj en bazlernejo aŭ ontaj sociaj laboristoj. Ilia intereso al aliaj lingvoj ol la vaska aŭ la angla estis, do, ne tro alta.

3. Mi jam pardon-petas, ĉar lasta-tempe ŝajnas eksmode kaj hontige paroli prie, sed ĉu mi rajtas diri ion pri la "interna ideo"? La unuan tagon, kiam mi ekstaris antaŭ la lernantoj kaj rigardis al ili, mi tuj komprenis, ke ne temas pri la samaj lernantoj vizitantaj kursojn en niaj kluboj aŭ en urbaj kultur-domoj. Ili ĉeestis la kurson "profesie", t. e. pro la devo studi, ne pli. Ĉu tio sufiĉas por entuziasme lerni Esperanton? Jam de la komenco mi pensis, ke ne... Kaj ne eraris. Esperanto estas io plia ol simpla lingvo, spite al alies opinioj.

4. Manko de taŭgaj intru-rimedoj. Kiel mi diris supre, mi disponis sufiĉe riĉan sortimenton da instru-helpiloj, sed la materialo, kiun mi alportis ne estis je la sama nivelo. Mankas -aŭ mi ne scias pri ilia ekzisto- komputilaj programoj, kvalitaj sonkasedoj por instrui la lingvon, taŭgaj kaj ne tro kostaj lernolibroj, lum-bildoj -mi mem pretigis kelkajn, precipe historiajn-, ktp.

Por fini, restas la demando: kio pri la estonteco? Respondo malfacilas. La sperto estis vere interesa, kaj ĝi havos daŭrigon: dum ĉi lernojaro estos denove Esperanto-kurso en la Vaska Universitato.

Mi esperas, ke la ĉi-jaraj travivaĵoj helpos plibonigi la kurson kie ĝi plej lamis. Studentoj, ekzemple, pli interesiĝis pri la historio, celoj, filozofio ktp. de la lingvo ol pri la lingvo mem. Ĉu ne estus pli oportune enkonduki universitat-nivele nur la ideon pri Esperantio (historio, organizaĵoj, servoj, nuntempa rolo...), kune kun la rudimentoj de la lingvo, kaj lasi al Esperanto-kluboj la taskon pri lingva trejnado?

Ne estas ver-ŝajne, ke en proksima estonteco ni vidos oficialajn esperantologiajn studojn en universitatoj. Ni tamen havas la eblon eksplu-ati la t.n. "virtualajn universitatojn", kie la stud-fakoj instruiĝas per la Interreto. Per ili ni povus atingi pli da studentoj el ĉiuj fakultatoj kaj lernejoj de la universitato, facile rilatigi ilin kun la tuta mondo, kaj lernantoj povus elekti kiam studi, sen strikta horaro. Ĉi tio povus esti la estonteco. Ĉu ni estas preparitaj por ĝi?

Jesús-Miguel García Iturrioz

UNIVERSALA KONGRESO 2001 EN ZAGREBO

De la 21a ĝis la 28a de julio okazis en Zagrebo, Kroatio, la 57a Universala Kongreso de Esperanto sub la temo "Kulturo de dialogoj - dialogo inter kulturoj". Inter la preskaŭ 1.700 partoprenantoj ĉeestis ankaŭ kvin bilbaanoj: Eduardo Larrouy, Teodoro Ibañez, Jesús-Miguel García Iturrioz, David Mediavilla kaj Lourdes Martínez, nun-tempe universitata profesorino en germana universito. David Mediavilla raportas al ni sube pri la evento.

Kompare al aliaj kongresoj, kiujn mi ĉeestis, ĉi lasta ricevis multan helpon de kroatiaj aŭtoritatoj: Stjepan Mesic, la landa prezidanto, parolis kadre de la solena malfermo, kaj la kroata Poŝto emisiis specialan poŝt-markon pri la kongreso. Veturi trame tra Zagrebo estis senkosta por kongresanoj, kaj la t.n. amasloĝejo estis armea lernejo tre malmultekosta, tute ne amasa kaj komfortega, kompare al aliaj en kiuj mi loĝis. Estis du kongresejoj ĉe paralelaj stratoj: Fakultato pri elektro-tekniko kaj koncertejo.

Ĉiu selektas lau propra prefero el la programo. Multajn erojn mi ne ŝatis, kaj la plej interesaj ne realiĝis kiel mi antaŭvidis. Prelegoj pri kroata historio, ekzemple, ne sufiĉe profundis, almenaŭ por mia ŝato. Mi plej ĝuis kurson pri la kroata lingvo -kiun tamen mi povis praktiki surstrate- kaj ankaŭ kurson pri glagolico, praa alfabeto uzata de kroatoj kaj aliaj slavoj de Mezepoko ĝis la 19a jarcento. Mi bedaŭras, ke mi ne spektis du teatraĵojn: "La plej bela tago de Maria Theresia", ludata en la Kroata Nacia Teatro, kaj "Malfermilo". Mi tamen tre ŝatis la pecojn reludatajn dum la solena fermo.

Aliaj programeroj, kiujn mi ne atentis, mi estis reapero de oratora konkurso, inaŭguro de la monumento "Futuro", antaŭ la Fakultato pri ekonomiko, kaj elekto de la nova UEA-estraro, prezidota de Renato Corsetti.

Mi tamen multe turismis tra Zagrebo. Somere kaj aŭguste ne kalkulu hom-amason. Zagrebanoj emis iri al mar-bordo pro la varmo. Zagrebo havas muzeojn, katedralojn kaj etosejojn, sed ne sufiĉe por tuta semajno, almenaŭ laŭ mia opinio.

La venonta UK okazos en Fortaleza, Brazilo. Fortalezanoj jam videble varbis en Zagrebo, eĉ kun helpo de turismaj aŭtoritatoj kaj tipaj ĉapeloj.

David Mediavilla

Impactones a partir de finales de Octubre)

PAROLOU KIEL EBLE BONE

rara kaj **stranga**

Ordinara eraro: **Esperantio estas plena de raruloj*

En esperanto "rara" signifas "alt-valora pro sia malofteco", kaj ne "stranga, kurioza aŭ ekstravaganca". Same oni povas diri pri ĉiuj ĝiaj derivaĵoj: "rarulo", "rarajo", "rariĝi", ktp.
Komparu:

Esperantistinoj en Hispanio estas raraj, sed ja tute ne strangaj
Petro ne parolas esperanton al sia filo ĉar li ne volas fari el li strangulon

Korekta frazo, do, estas:

Esperantio estas plena de stranguloj

nur, ankaŭ, eĉ, almenaŭ: vort-ordo

Ordinaraj eraroj: **Al la lasta kurso aliĝis du lernantoj nur*
**Kial vi kisas ĉiujn krom mi? Mi ankaŭ volas kison!*

En esperanto adverboj kiel "nur", "ankaŭ", "eĉ", "almenaŭ" kaj aliaj iras kutime antaŭ la vorto, kiun ili senpere rilatas.
Komparu:

Almenaŭ la estraranoj parolis esperanton [la aliaj asocianoj ne parolis]
La estraranoj parolis almenaŭ esperanton [krome, ili parolis ekz. la grekan, la rusan kaj la irlandan]

Dum la UK eĉ akademianoj kantis kaj svingis la verdan flagon sur la strato [ne nur strangaj esperantistoj kantis kaj paradis, sed ankaŭ seriozaj akademianoj]
Dum la UK akademianoj eĉ kantis kaj svingis la verdan flagon sur la strato [akademianoj ekz. ne nur diskutis arde pri la akuzativo, sed ankaŭ kontaĝiĝis de la verda etoso kaj eliris surstraten kun la strangaj esperantistoj]

Korektaj frazoj, do, estas:

Al la kurso aliĝis nur du lernantoj
Kial vi kisas ĉiujn krom mi? Ankaŭ mi volas kison!

LASTAJ LIBROJ EN E-O

•**Sferoj 10**. Komp. Miguel Gutierrez Adúriz. Santander: Grupo Nifo, 2000. 206 p. Rakontoj scienc-fikciaj.

•**Vergilio, la patro de Okcidento**. Theodor Haecker. El la germana trad. Vinko Oslak. Klaŭdiforumo: Hermagoras /Mahorjeva, 2000. 109 p. Kultur-filozofia eseo pri Eŭropo.

•**La lada tambureto.** Gunter Grass. El la germana trad. Tomasz Chmielik. Bielsko-Biala (Pollando): KLEKS, 2000. 533 p. Romano.

•**Cecilja**. Felix Timmermans. El la flandra trad. pluraj aŭtoroj. Antverpeno: Flandra E-Ligo, 2000. 106 p. Rakontoj.

•**La Bato**. Lena Karpurina. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2000. 125 p. Rakontaro originala en E-o.

•**Resurekt**o. Lev Tolstoj. El la rusa trad. Viktor Sapoĵnikov. Jekaterimburg (Rusio): Sezonoj, 2000. 368 p. Romano.

•**La hobito, aŭ tien kaj reen**. John Ronald Tolkien. El la angla trad. Christopher Gledhill kaj Williand Auld. Jekaterimburg (Rusio): Sezonoj 2000. 223 p. Mir-fabelo.

•**La kosmo kaj ni**. David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel. Antverpeno (Belgio): Flandra Esperanto-Ligo, 2001. 199 p. Man-libro pri astronomio. Originale verkita en Esperanto.

•**Neĝo kaŝas nur...** Sten Johansson. Skövde (Svedio): Al-fab-et-o, 2001. 79 p. Krim-romaneto originale verkita en Esperanto.

•**La tago kiam Jesuo perfidis Judason**. Manuel de Seabra. Vieno: IEM, 2001. 135 p. Romano originale verkita en Esperanto.

•**Matematiko kaj legaĵoj por ĉiu**j. Ljudmila Arnaudova kaj Petko Arnaudov. Pazarĝik: E-Societo Radio, 2000. 112 p. Matematikaj distraĵoj. Originale en Esperanto.

•**La migranta judo**. August Vermeylen. El la nederlanda trad. Christian Declerck. Antverpeno (Belgio): Flandra E-Ligo, 2000. 71 p. Romano.

•**Malvivaj animoj**. Nikolaj Gogol. El la rusa trad. Vladimir Vyĉegĵanin. Jekaterimburg (Rusio): Sezonoj, 2001. 223 p. Klasika rusa romano.

•**Kaoso en Budapeŝto**. Nina Langlet. El la sveda trad. Kalle Kniivilä. Varna (Bulgario): Bambu, 2001. 168 p. Pri la vivo de la esperantisto kaj diplomato Valdemar Langlet en 1944.

•**La fotoalbumo**. Trevor Steel. Vieno: IEM, 2001. 366p. Romano originale verkita en Esperanto.

•**La Profeto el Pedras**. Gersi A. Bays. Chapecó (Brazilo): Fonto, 2000. 237 p. Romano originale verkita en Esperanto.

•**La mirinda sorĉisto de Oz**. L. Frank Baum. El la angla trad. H. R. Dreyer. Berkley (Usono): Bero, 2000. 145 p. Klasika infan-libro.

LIBROKATALOGO: Ĵus aperis la "Esperanto-Katalogo" de la libro-servo de UEA. Kun eldon-kvanto de 7.500 ekzempleroj, la 189-paĝa katalogo koncize priskribas laŭ 32 fakoj 4.387 titolojn haveblajn ĉe la libro-servo de UEA. Daŭre aktualigata versio troveblas en la Interreto ĉe www.uea.org/katalogo.